

Marie Hankel,

Nia lingvo

Nia lingvo Esperanto
donas helpon en la mond'.
Ho, kreskadu la anaro
de pacema granda rond'.
Kaj fermiĝu per kompreno
de l'malpaco ĉefa front',
Nia lingvo Esperanto
povas servi kiel pont'.

Ni ne perdu la kuraĝon,
alta estas nia cel',
Nur antaŭen! Nia stelo
alte brilas en ĉiel'.
Pro la lingvo Esperanto
disvastiĝos granda hel',
Ni ne perdu la kuraĝon,
alta estas nia cel'.

Nia lingvo Esperanto
disvastiĝas tra l' aer'
Ĝis popoloj pli liberaj
sin komprenos trans la ter'.
Ni laboru ne laciĝe
por la venko kun esper'.
Nia lingvo Esperanto,
tra la tuta ronda sfer'.

...

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas MARIE HANKEL (nask. Dippe, *1844-02-02 – †1929-12-15), publikigita 1907.*

Arg-468-895 (2008-04-22 13:28:40)

Laŭ telefona informo de s-ro d-ro Wolfgang Schwartz (Finsterwalder Str. 7, D-01239 Dresden) de l' 21.04.2008 la poemo estas verkita de la poetino Marie Hankel en 1907.